

25a ORDINARA DIMANĈO – A – 24a de septembro 2017

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

ĈU VI ESTAS ENVIEMA, ĈAR MI ESTAS BONA?

El la evangelio laŭ Mateo 20, 1-16a

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj ĉi tiun parabolon: „Tia estas la regno de Dio: Iu havis grandan vitejon kaj iumatene, frue, li eliris por dungigi laboristojn por ĝia kulturado. Li kontraktis kun ili po unu denaro por la tago, kaj li sendis ilin en sian vitejon. Ĉirkaŭ la naŭa horo li eliris denove, kaj vidis aliajn senokupajn homojn sur la placo. Li diris al ili: ‚Iru ankaŭ vi en mian vitejon, kaj mi pagos al vi, kiom estas juste.‘ Kaj ili iris. Simile li faris ĉirkaŭ tagmezo kaj la dekkvina horo. Elirinte ankoraŭfoje ĉirkaŭ la deksepa horo, li trovis aliajn homojn. Li demandis: ‚Kial vi staras ĉi tie senokupe la tutan tagon?‘ Ili respondis: ‚Ĉar neniuj nin dungis.‘ Li diris: ‚Ankaŭ vi iru en mian vitejon.‘

Ĉe la sunsubiro la posedanto de la vitejo diris al sia administranto: ‚Voku la laboristojn kaj pagu al ili la salajron, komencante de la laste venintaj.‘ Li vokis do tiujn, kiuj estis dungitaj ĉirkaŭ la deksepa horo, kaj donis al ĉiu unu denaron. Tiuj, kiuj komencis labori unuaj, supozis, ke ili ricevos pli; sed ankaŭ ili ricevis po unu denaro. Tiam ili murmuris kontraŭ la mastro, dirante: ‚Ĉi tiuj venis lastaj kaj laboris nur unu horon, kaj vi pagis tiujn egale al ni, kiuj portis la ŝarĝon de la tuta tago sub la suno.‘ Sed la mastro diris al unu el ili: ‚Amiko, mi ne trompis vin: ĉu vi ne kontraktis kun mi por unu arĝenta monero? Prenu do vian pagon kaj silentu. Se mi volas doni al ĉi tiu lasta, kiom al vi, ĉu ne estas permesite al mi fari per mia mono tion, kion mi volas? Aŭ ĉu vi estas enviema, ĉar mi estas bona al ili?‘ Tiel lastaj estos unuaj kaj unuaj estos lastaj.“

La parabolo de la vitejo en la 20-a ĉapitro de la evangelio de Mateo estas la unua el tri paraboloj temantaj pri vitejo. La vitejo, ni tion scias, estis bildo de Israelo, de la Israela popolo. Per ĉi tiu parabolo Jesuo intencas proponi ŝanĝon de interrilato kun Dio: dum en la religio la amon de Dio oni devas meriti pro siaj streboj, pro siaj meritoj, kun Jesuo la amon de Dio oni devas akcepti kiel donacon fare de la Sinjoro. Do kun Jesuo la amo de Dio ne plu estas premio pro la meritoj de la personoj, ĉar ne ĉiuj povas havi meritojn, sed donaco pro la bezonoj de la personoj, ja bezonojn ĉiuj havas.

Skribas Mateo: *"la regno de Dio"*, laŭvorte *"la regno de la ĉieloj"*, kiu ne estu komprenata kiel la transmondo, sed kiel la alternativa socio kiun Jesuo venis proponi, *"estas kiel iu, kiu havis grandan vitejon kaj iumatene, frue, eliris por dungii laboristojn por ĝia kulturado."* Estas strange, ke laŭ la evangeliisto Jesuo diras, ke eliras la domomastro. Ordinare estis la administranto, tiu kiu iris serĉi la laboristojn, sed, por komprenigi la urĝon kaj la gravecon de tio, kio estas farota, eliras la domomastro. *"Li kontraktis kun ili po unu denaro por la tago"*, denaro estis arĝenta monero, kiu pezis ĉirkaŭ 4 gramojn. Unu denaro estis la ordinara potaga salajro por laboristo. Poste skribas la evangeliisto, ke *"Ĉirkaŭ la naŭa horo li eliris denove, kaj vidis aliajn senokupajn homojn sur la placo."*, ili estas senokupaj ne ĉar ili estas mallaboremaj, sed ĉar neniu ilin vokis labori. Tiam diras la domomastro: *"Iru ankaŭ vi en mian vitejon,"* kaj ĉifoje li diras *"kaj mi pagos al vi, kiom estas juste"*, tio estas, surbaze de la laboro, kiun vi faris.

Sed estas urĝo flanke de la mastro de la vitejo, kiu komprenigas, ke li agas pli por la bono de la dungitoj, ol por sia bono. Fakte, li eliras denove ĉirkaŭ tagmezo, poste ĉirkaŭ la dekkvina, kaj li plue eliras ĉirkaŭ la deksepa. La laboro finiĝis je sunsubiro, pli malpli ĉirkaŭ la deksepa; *"li trovis aliajn homojn. Li demandis: Kial vi staras ĉi tie senokupe la tutan tagon?"*. Ili respondis: *"Ĉar neniu nin dungis. Li diris: Ankaŭ vi iru en mian vitejon."* Do ne temas pri bezono de la mastro, li vokas ilin al laboro, kiu daŭros maksimume unu horon. Temas pri bezono de la laboristoj, ĉar se ili ne laboras, tiun tagon ili ne manĝas, ja la salajro estis potaga.

"Ĉe la sunsubiro la posedanto de la vitejo", laŭvorte *"la sinjoro"*, ĉar per ĉi tiu termino la evangeliisto volas komprenigi, ke Jesuo estas parolanta pri Dio, *"diris al sia administranto: Voku la laboristojn kaj pagu al ili la salajron, komencante de la laste venintaj."*, la lastaj faris nur ŝajnan laboron, eĉ ne unu horon. *"Li vokis do tiujn, kiuj estis dungitaj ĉirkaŭ la deksepa horo, kaj donis al ĉiu unu denaron."* Tio, pri kio la mastro estis interkonsentinta ĉe la komenco kun tiuj, kiuj laboris la tutan tagon, estas donata ankaŭ al tiuj, kiuj laboris tre malmulte, al la lastaj.

"Tiu, kiuj komencis labori unuaj, supozis, ke ili ricevos pli; sed ankaŭ ili ricevis po unu denaro". La mastro forprenas nenion de iu ajn, li estis interkonsentinta pri po unu denaro kaj unu denaron li donas, ne estas

maljustaĵo fare de la mastro. Sed nature, se al la lastaj li donis unu denaron, kiu scias, kiom ni ricevos. *"Tiam ili murmuris kontraŭ la mastro, dirante: Ĉi tiuj venis lastaj kaj laboris nur unu horon,"*, do temas pri ŝajna laboro, *"kaj vi pagis tiujn egale al ni, kiuj portis la ŝarĝon de la tuta tago sub la suno."*, jen, ĉi tiu mastro ne estas justa. Jesuo volas komprenigi, ke la justeco de Dio estas tre malsama: Dio rigardas la bezonojn de la personoj, ne iliajn meritojn.

"Sed la mastro diris al unu el ili: Amiko", ĉi tiu esprimo en la evangelio de Mateo estas ĉiam malpozitiva. Ĝi estas la esprimo, per kiu li sin adresas al Judaso, aŭ al la personoj, kiuj estas kulpaj. Li diras: *"mi ne trompis vin: ĉu vi ne kontraktis kun mi por unu arĝenta monero? Prenu do vian pagon kaj silentu"*, laŭvorte kaj pli milde, *"iru"*.

"Se mi volas doni al ĉi tiu lasta, kiom al vi, ĉu ne estas permesite al mi fari per mia mono tion, kion mi volas?", jen, Jesuo estas parolanta pri la malavareco de Dio, kiu estas donacata al ĉiuj, kiuj bezonas ĝin. *"Aŭ ĉu vi estas enviema,"*, laŭvorte via okulo estas malica, bildo de avareco, de ŝparemo, *"ĉar mi estas bona al ili?"*, jen kia esta Dio, Dio estas boneco.

Kaj li finas: *"Tiel lastaj estos unuaj kaj unuaj estos lastaj."*, ĉi tiu fermo ligiĝas kun la fermo de la 19-a ĉapitro, versiklo 30, kie estis skribite *"multaj el la unuaj estos lastaj kaj la lastaj unuaj"*; ĉi tie, kontraŭe, ligante sin al tiu instruo kaj enfermante ĝin tute, li diras, ke la lastaj estos la unuaj, kaj la unuaj la lastaj. Ĉu tion komprenis liaj disĉiploj? Tute ne, senutila parolo. Tuj poste, alvenos la patrino de la filoj de Zebedeo, peti la plej gravajn postenojn por siaj filoj.